

Votre revue de l'Association Pour l'Espéranto

N° 2 - 2016

 **Espéranto**
en
Marche



Enhavo

- Paĝo 2 : PEKO 2016 (Artikolo en la ONDO).**
- Paĝo 3 : La Biologia Nomenklatur.**
- Paĝo 4 : Pri la origino de l'kanzono (Raymond Schwartz).**
- Paĝo 5 : Ezopa Fablo (Kolomano Kalocsay).**
- Paĝo 6 : Humuraĵoj el la tuta mondo.**
- Paĝo 7 : Vortfarado : « TUKO ».**
- Paĝo 8 : NORDA KURIERO (Esperanto-Nord).**
- Paĝo 9 : « « » »**
- Paĝo 10 : Informoj pri Esperanto en Belgio kaj Internacie.**
- Paĝo 11 : Informoj pri Esperanto en Valonio.**
- Paĝo 12 : Kotizoj 2016 por APE kaj UEA. Abono al Eo-Info.**

Editeur responsable: Claude Glady
Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE
071/64 49 16 cglady@arcadis.be

PEKO 2016

Tiu artikolo pri PEKO aperis en la numero de « LA ONDO DE ESPERANTO »



PEKo: Post marŝado (7 km) kaj trajna vojaĝo 22 gejunuloj pretas alfronti la riveron Lesse.

La plej juneca kaj agrabla PEKo

Inter la 4a kaj la 8a de majo okazis la tradicia Printempa Esperanto Kunveno (PEKo), en La Marlagne, en Namuro (Valonio, Belgio), organizita de Valère Doumont (Lupo), estro de la Verdaj Skoltoj. Pli ol 70 partoprenantoj venis el Belgio, Francio, Luksemburgo, Nederlando, Germanio, eĉ el Usono.

La ampleksa programo enhavis lingvokursojn je kvar niveloj (etuloj kun Nicky Janssens, komencantoj kun Françoise Pellegrin, progresantoj kun Michel Dechy kaj Gunther Neue), seminariojn, prelegojn, koncertojn (Platano, Pjotr De Mulder kaj Anjo Amika), manlaborojn, ludojn, ekskursojn, diskutrondojn, renkontojn kaj biergustumadon.

Jen kelkaj priparolitaj temoj: Yves Nevelsteen pri “Esperanto tra interreto” (Duolingo, sociaj retoj), seminarioj pri “efika komunikado inter belgaj esperantistoj”, prelego de Frank van Hertrooij

pri “malkovro de planedoj ekster nia sunsistemo” kaj tre grava prelego de profesoro Damien Ernst pri “la nepra falo de elektroproduktado en Belgio”.

Danke al la bela vetero, bonegaj manĝoj kaj kvazaŭ luksa gastejo, la etoso iĝis tre bona. La partoprenantoj diris, ke la 5a PEKo estis la plej agrabla el ĉiuj.

Rimarkinda estis la junulara grupo: Verdaj Skoltoj, kelkaj iliaj amikoj, kaj ankaŭ infanoj, genepoj kaj genevoj de Esperantistoj. Entute ĉirkaŭ 20 adoleskuloj kaj junuloj inter 12 kaj 25 jaroj. Lupo kaj Melinde preparis por ili Aventuran Tagon. Sepkilometra luda marŝado ĝis la stacidomo de Namuro, trajna vojaĝo ĝis rivero por longa kajakado (4 horoj) sur la Lesse-rivero ĝis Mozo.

Post la renkontiĝo kvar neesperantistaj adoleskuloj decidis aliĝi al la Verdaj Skoltoj.

Jean-Pol Sparenberg

LA BIOLOGIA NOMENKLATURO

La taksonomio estas la scienco pri la distingo de la taksonoj kaj ilia rangigo kaj loko en la klasifiko de la vivuloj (PIV). Internacie, oni uzas kutime la [latinajn nomojn] !

Vivo (= Viva mondo) kompare al la malviva aŭ minerala !

Domano = Superregno = imperio : [Bakterioj](#), [Arĥioj](#), kaj [Eŭkariotoj](#).

la [bakterioj](#) (prokariotaj unuĉelaj sen kerno)

la [arĥioj](#) (prokariotaj unuĉelaj sen kerno)

la [protistoj](#) (eŭkariotoj unuĉelaj)

Regno : Fungoj Plantoj Bestoj

la [fungoj](#) (eŭkariotoj plurĉelaj alinutraj kiuj disigas)

la [plantoj](#) (eŭkariotoj plurĉelaj, memnutraj)

la [bestoj](#) (eŭkariotoj plurĉelaj alinutraj kiuj enigas)

Filumo (Embranchement) : Ĥorduloj

Klaso : Mamuloj, birdoj, insektoj. Superklaso por fiŝoj.

Ordo : sufikso -ul: parhufuloj, skvamuloj

-formaj : paseroformaj, strigoformaj

Ekz : Primatoj, Karnivoroj, Dipteroj.

Familio : sufikso -ac ([botaniko](#)), -ed [-id]([zoologio](#))

Ekz : homedoj, kanisedoj

Genro : Homo, kverko, rozo, amanito,

Specio (Du vortoj : la unua komencigas per majusklo, finiĝas per -o ,

la dua

per minusklo kaj

per -a)



Jen la supra taksonomio de la klaso de la primatoj :

Superregno	Eŭkariotoj	[Eukaryota]	(Eucariotes)
Regno :	Bestoj	[Animalia]	(Animaux)
Filumo :	Ĥorduloj	[Chordata]	(Chordés)
Subfilumo :	Vertebruloj	[Vertebrata]	(Vertébrés)
Klaso :	Mamuloj	[Mammalia]	(Mammifères)
Subklaso :	Placentuloj	[Eutheria]	
Klado :		[Euarchonoglires]	
Superordo :		[Euarchonta]	

Ĉe la primatoj, ni povas distingi : Modernaj Homoj, Ĉimpanzoj kaj Goriloj :

Ordo :	Primatoj	[Primates]
Subordo :		[Haplorrhini]
Superfamilio :		[Hominoidea]
Familio :	Homedoj	[Hominidae]
Subfamilio :	Homenoj	[Homininae]

Tribo : [Hominini] [Gorillini]

Subtribo : [Panina]

Genro : [Homo] [Pan] Gorilo[Gorilla]

Specio : [Homo sapiens] [Pan troglodytes] [Gorilla gorilla]

Subspecio :

PRI LA ORIGINO DE L'KANZONO

(Humura teksto de Raymond Schwartz)

Tio-ĉi ne estas kurso. Mi ne intencas klarigi al modernaj homoj, kio estas kanzono. Ĉiu posedanto de la Plena Vortaro konas la difinon de kanzono.

Sed pri unu punkto mi deziras alporti informon.

Oni ĝenerale, eĉ en kleraj medioj, scias tute nenion pri la origino de l'kanzono, kaj se vi demandas : "Kiu inventis la kanzonon ?", unuj respondos per stultaĵoj, aliaj, pli modestaj, konfesos sian nescion.

Nu, gesinjoroj, mi malkaŝas al vi : estis la negroj, kiuj inventis la kanzonon !

Por kaŝi sian nudecon, de ĉiuj tempoj, la negroj portas ĉirkau la talio larĝajn zonojn, kiujn kutime ili plektas el kanoj.

Ĉar ili la unuaj havis la ideon fari zonojn el kanoj, oni povas aserti, ke la negroj estas la inventistoj de l'kanzonoj.

Kaj vespere, kiam milda venteto blovas susure sur la bordoj de Orinoko aŭ Kune ne tra la negraj kanzonoj, ĉiu kano kontribuas sian tonon, kaj la tuto konsistigas ĉarman arion, kiun oni nomas - jes vi divenis - kan-arion !

Kompreneble, ĉiu rajtas garni sian zonon laŭ siaj preferoj kaj gusto.

Unuj uzas rubandojn kaj bukojn, aliaj - florojn kaj bantojn.

Sed kio utilas al la negroj por garni zonojn ? - La kanoj.

Kaj kio utilas al civilizitaj homoj, kiam ili volas... garnizonojn ? La kanonoj.

Tie kuŝas la diferenco. Kaj estas bone tion scii.

BN : Buko : Metala kadreto kun movebla pinglo por fiksi zonon.

Schwartz multe uzis vortludojn : Dek-reto ; Kata-strofo ; Sin-takso; Barka-rola;.....

Raymond SCHWARTZ [Rajmondo ŜVARCO]

(8-an de aprilo 1894, 14-an de majo 1973)

Li estis franca bankoficisto kaj esperanto-verkisto. Li naskiĝis en Metz, lorena urbo tiam germana, sed en franclingva familio. Li ricevis bonegan edukadon kaj ne nur flue parolis la francan kaj la germanan, sed ankaŭ lernis la latinan kaj la grekan;

tre frue li esperantistiĝis kaj revis pri paca estonteco danke al Esperanto.

La unua mondmilito estis por li, kiu estis enarmeigita kaj devis batali sur la orienta fronto, terura seniluziigo. Post la milito li ne restis en Metz, denove franca, sed elmiĝis al Parizo, kie li laboris kaj fine emeritiĝis kiel kundirektoro de grava banko.

Havante ian duoblan vizaĝon, li estis serioza kaj kompetenta homo en sia profesio, kaj samtempe ludis en Esperantistaj kabaredoj, kie li kreis multe da skeĉoj, tiel ke multe da Esperantistoj, kiuj lin nur supraĵe konis, lin imagis ĝoja drinkemulo.

Liaj skeĉoj kaj liaj libroj estas ege amuzaj kaj spritaj, sed ne ĉiam tre prudaj !

Pliam amuzaj poemoj plume de li estas *La Diversaj Aĝoj de l' Homo* kaj *Liriko kaj Praktiko*. Lia romano *Kiel akvo de l' rivero* (1963) estas unu el la plej longaj kaj bontaksataj romanoj en Esperanto.

En Parizo Schwartz gvidis la kabaredojn: *Verda Kato* (1920 - 1926), *Bolanta kaldrono* (1936 - 1939), *Tri koboldoj* (1949 - 1956). Li redaktis la ĵurnalon *La Pirato* kaj kontribuis per humuraĵoj inter alie al la *Sennacieca Revuo* de SAT..

EZOPA FABLO (Verkis K. Kalocsay)

La ĉeval' kaj bovo ie
Ekdisputis energie
Pro l' merito en milito.
Diris la ĉeval' incite :

"He ! malsprite estas dubi
Nian gloron kaj valoron.
La ĉevalo al batalo
kuri ĉiam estas preta
Je trumpetaĵoj.
Kaj la ŝarĝon de l' kanonoj
Tra abruptaj ŝtonoj,
Kiu trenis ? Nur ni !"
La ĉevalo henis.

Bov' respondis dum remaĉo :
"Ĉevalaĉo ! vi ja vane fanfaronas,
Ĉar mi donas tamen
La plej grandan servon,
Ja al si la cerbon
La marŝalo vane rompas,
Vane pompas la kuraĝo,
Se l' furaĝo mankas.
Kaj al kiu dankas
La viandon la soldat' malsata ?
Al la bovo malŝatata !
Via gloro vane ŝajnas,

Paŝtis sin melankolie
Ankaŭ la azeno tie.
Li malplaĉe aŭdis,
Ke sin ili laŭdis.
Ĝi iais kaj balais
la aeron per oreloj
Kaj ekkriis :

"Bagateloj ! Jen la vero :
Sur la tero se azenoj
Ne amasus, la milit'
Eĉ ne okazus !"

BN : Iai = azenbleki



La libro titolita « Ezopa Saĝo » estas unu el la juveloj de nia Esperanta Literaturo ! Ĝin versadis nia poeto Kalomano Kalocsay en lingvo simpla, sed tamen vortare riĉega. Tiu verko estis eldonita en 1956 de la kopenhaga eldonejo Koko.

KALOCSAY, Kálmán (Kolomano). 1891-1976.

Hungaro, kuracisto. Naskiĝis en Abaujszantó. Lernis en Miŝkolca gimnazio. Esperantisto de 1911. Studis medicinon en Budapeŝto, diplomiĝis en 1916. Militservis dum la Unua Mondmilito, de 1920 havis kuracistan postenon ĉe Budapeŝta infekta hospitalo kaj poste instruis medicinon ĉe universitato. Aktivis en la Hungaria Esperanto-movado, estis ĉefredaktoro de la gazeto "Literatura Mondo". Akademiano.

Kune kun Gaston Waringhien verkis *Plena Gramatiko*, poste *Plena Analiza Gramatiko*, PAG.

IOM DA HUMURAJĜOJ EL LA TUTA MONDO

Du finnoj ĉasis sovaĝajn anserojn en malebenega tereno, kaj dum ilia serĉado, subite unu el ili malbonŝanĉe enakviĝis en marĉon. La alia kuregis al la proksima vilaĝo por havigi helpon.

- « Ĉu urĝas ? » oni demandis en la vilaĝo.
- « Kiel profunde li estas malleviĝinta ? »
- « Ĝis la genuoj ! » li respondis..
- « Do, ni havas sufiĉe da tempo ! »
- « Ne, ĉar li havas la kapon malsupre ! ».

El « BONA RIDO » de Axel Helm. Malmö 1965

Al la demando, kiun pli agrablan komplimenton li ricevis en sia vivo — Andrzej Pettyn respondis :

- « Plej agrable komplimentis min skota esperantisto, kiu dum la Universala Kongreso en Varsovio en 1987, tute malferme kaj sincere diris al mi » :
- « Tiom ekplaĉis al mi viaj sonkasetaj E-ekzercoj, ke mi preskaŭ aĉetis ilin... »

El «HUMURO LAŬ LA SKOTA MANIERO» Andrzej kaj Remigiusz Pettyn. FEL 1995

Ĉiufoje, kiam tiu lernanto pasas antaŭ la templo, la ŝtona statuo de la Genio haste elstaras.

- « Tio estas signo, ke mia filo fariĝos granda mandareno », ĝoje pensas la patro.
« La vilaĝa Genio mem ne aŭdacas resti sida antaŭ li. »

Ho ve ! Kreskante, la eta mallaboremulo fariĝas neniu alia, ol perfekta ŝtelisto.

La kolera patro venas riproĉi la Genion :

- « Kruela Genio ! Vi skandale trompis min. »
- « Ĉu vere ? » demandas la atakato.
- « Kial vi ekstaris, ĉiufoje kiam pasis mia juna kanajlo ?
Tio igis min pensi, ke li havos baldaŭ altan destinon ! ».
- « Kia eraro ! » Ekridas la antaŭzorgema Genio.
- « Mi simple timis, ke li ŝtelus miajn babuŝojn ! »

El « RIDI VJETNAME » Hanojo 1981

KIA LINGVO ESTAS MALBELSONA !

Kiam Antoni GRABOWSKI (1857-1921) konatiĝis kun juna virino, li ĉiam kvazaŭ amindumis ŝin deklamante al ŝi, ĉe la orelo, siajn plej novajn verkojn.

Iun vesperon la dommastrino diris al li :

« Antoni, bonvolu deklami ian versaĵon en via fama lingvo Esperanto. Vi ĉiam parolas pri ĝi, sed neniam per ĝi. »

Antoni ekdeklamis... Kiam li finis, iu ĉeestanto diris :

« Sed, ĝi estas ja neimageble malbelsona, via lingvaĉo ! Kompreneble—tia miksaĵo ! »

« Nu kiu povis esperi ion alian ? » - aldonis grava gasto.

« Mi— » diris Grabowski. « Mi petas pardonon, Esperanto ne kulpas. Mi deklamis itale verkon de Petrarko. »

El « ŜERCOJ, RAKONTOJ » de Benczik Vilmos Budapest 1972.

TUKO : linge, textile..

(Vortfarado)

Ĉu vi povas kompletigi la tradukaĵojn ? Ĉu vi kapablas proponi pliajn ?

Tuketo : Lingette

Tablotuko : Nappe.

Tukego :

Murotuko :

Tukaĉo : Loque

Seĝotuko :

Tukaro :

Vundotuko : Pansement

Tukujo :

Vindotuko : Lange

Bantuko : Serviette de bain

Mortotuko : Linceul

Mantuko : Manique

Signaltuko :

Nasztuko : Mouchoir

Kapotuko : Foulard

Viŝtuko : Torchon

Tukopeco :

Antaŭtuko : Tablier

Tukopinĉilo : Pince à linge

Antaŭtuketo : Bavette

Tukoŝranko :

Subtuko : Alaise

Tukolavilo:

Surtuko :

Tukopurigilo:

Poŝtuko : Mouchoir de poche

Tukobretaro :

Litotuko :

JUNA	<input type="radio"/>	chaud	<input type="radio"/>		MALJUNA	<input type="radio"/>	triste	<input type="radio"/>		JUNECO	<input type="radio"/>	chaleur	<input type="radio"/>
GAJA	<input type="radio"/>	beau	<input type="radio"/>		MALGAJA	<input type="radio"/>	froid	<input type="radio"/>		GAJECO	<input type="radio"/>	solidité	<input type="radio"/>
VARMA	<input type="radio"/>	jeune	<input type="radio"/>	MAL	MALVARMA	<input type="radio"/>	vieux	<input type="radio"/>	ECO	VARMECO	<input type="radio"/>	jeunesse	<input type="radio"/>
FORTA	<input type="radio"/>	gai	<input type="radio"/>	→	MALFORTA	<input type="radio"/>	vilain	<input type="radio"/>	→	FORTECO	<input type="radio"/>	beauté	<input type="radio"/>
BELA	<input type="radio"/>	solide	<input type="radio"/>		MALBELA	<input type="radio"/>	faible	<input type="radio"/>		BELECO	<input type="radio"/>	gaité	<input type="radio"/>

HUNDO	<input type="radio"/>	chat	<input type="radio"/>		HUNDEJO	<input type="radio"/>	litière	<input type="radio"/>		HUNDIDO	<input type="radio"/>	poulain	<input type="radio"/>
KATO	<input type="radio"/>	cheval	<input type="radio"/>		KATEJO	<input type="radio"/>	ruche	<input type="radio"/>		KATIDO	<input type="radio"/>	oisillon	<input type="radio"/>
BIRDO	<input type="radio"/>	abeille	<input type="radio"/>	EJO	BIRDEJO	<input type="radio"/>	niche	<input type="radio"/>	IDO	BIRDIDO	<input type="radio"/>	chiot	<input type="radio"/>
ĈEVALO	<input type="radio"/>	chien	<input type="radio"/>	→	ĈEVALEJO	<input type="radio"/>	nid	<input type="radio"/>	→	ĈEVALIDO	<input type="radio"/>	larve	<input type="radio"/>
ABELO	<input type="radio"/>	oiseau	<input type="radio"/>		ABELEJO	<input type="radio"/>	écurie	<input type="radio"/>		ABELIDO	<input type="radio"/>	chaton	<input type="radio"/>

NORDA KURIERO

Post la Gazeto, jen la Kuriero!

Nia federacia bulteno nomita *La Norda Gazeto* aperis unuafoje en 1908 kaj estis ricevata papere de ĉiuj federacianoj kaj abonantoj. Ni gratulas kaj varme dankas al ĝiaj ĉefredaktoroj kaj diversaj kontribuintoj pro ilia longdaŭra sindonemo.

Tamen la tempo ŝanĝiĝas, kaj nun la Federacio decidis transformi la Gazeton en novan, retroŝtan informilon: la *Norda Kuriero*. Jen ĝia unua numero!

Ĝi celas informi vin pri la vivo de la Nordfranca Federacio kaj ĝiaj kluboj. Ĝi entenos ankaŭ viajn proprajn kontribuojn. Ni klopodas por reta eldono ĉiun duan monaton. Ĝi estu ligilo inter ĉiuj ni en norda Francio!

Nepre notu nian retadreson, al kiu vi sendu viajn komentojn kaj informojn (pri klubaj kunvenoj, kursoj, diversaj aranĝoj, ktp.):

kuriero@esperanto-nord.org

La Federacia Komitato kunsidis

Sabaton la 17^{an} de januaro 2016 kunsidis la Federacia Komitato de la Nordfranca Esperanto-Federacio en Lambersart. Ĝin konsistigas 15 delegitoj el niaj ses membraj kluboj, kiuj kunvenas du aŭ tri foje ĉiujare. Jen kelkaj decidoj de la instanco:

1) Federacia jarkunveno en 2016:

La klubo Arras-Espéranto organizos la federacian jarkunvenon en **dimanĉo la 1^a de majo**: matene okazos la jarkunveno; posttagmeze okazos vizito de la Libra Salono kun budo pri Esperanto. Tiam la membraro renovigos la tutan Federacian Komitaton, kiu tuj poste elektos novan Estraron.

2) Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage:

Roch Jullien organizos la venontan Eŭropan Rendevuon en Stella-Plage dum la **19^a kaj 20^a de novembro**. Ĉirkaŭ Roch ekstaris helpskipo el 7 membroj de Arras-Espéranto. Roch volas iom renovigi la aranĝon, ekzemple: ebligi partopreni ekster la atelieroj; komenci la dimanĉan programon malpli frue; diversigi la dimanĉan posttagmezon cele al la komencantoj. La atelierojn gvidos



Katalin Kovats, Michel Dechy, Anne Jausions kaj Arlette Plutniak. Koncertos JoMo sabaton vespere.

3) Ekzamensesioj:

La Federacio organizos FEI-ekzamensesion kun la unua kaj dua gradoj en sabato la 18^a aŭ la 25^a de junio en Lillo (MRES). Ĝi ne organizos KER-ekzamensesion en 2016, Sed eble tia sesio povos okazi en la Eŭropa Rendevuo.

Dancu tutmonde en Araso!



La klubo Arras-Espéranto invitas vin al tuttaga staĝo por danci tutmonde kun Roch Jullien **dimanĉon la 20^{an} de majo**. La tago estos malfermita al ĉiuj komencantoj pri danco kaj pri la lingvo. Venu ankaŭ kun viaj familianoj kaj amikoj!

La staĝo okazos en la Kultura Oficejo de Araso (61 Grand-Place) ekde la 9:30 ĝis la 17:00, kaj kostos po 7 € por ĉiu partoprenanto (tiu kotizo ne inkluzivas la tagmanĝon). Surhavu komfortajn ŝuojn kaj malstriktaĵajn vestaĵojn.

Informiĝu kaj aliĝu per la retpaĝo de la staĝo: www.arras-esperanto.fr/dancu

Nova estraro por la Lilla klubo

Ĵaŭdon la 28^{an} de januaro jarkunvenis la klubo Lille-Villeneuve-Espéranto. La membroj elektis novan estraron, kiu konsistas el:

- Xavier Dewidehem, prezidanto;
- Michel Dechy, vicprezidanto;
- Katja Boen, ĝenerala sekretariino;
- Dorine Francheteau, ĝenerala vicsekretariino;
- Richard Valet, kasisto;
- Pierre Dufour, vickasisto.

La klubo kunvenos:

- ĵaŭdon la 10^{an} de marto je la 19:00 en Villeneuve-d'Ascq (FOS Tennis, 70 rue du Lt-Colpin);
- ĵaŭdon la 14^{an} de aprilo je la 19:00 en Lillo (MRES, 23 rue Gosselet).



BALDAŬAJ RENKONTIĜOJ

Tago de la Flandraj Ardenoj: la Kortrejka klubo invitas vin por dimanĉo la 24^a de aprilo, kun matena promenado en la naturo (Zegelsem) kaj posttagmeza vizito de malnova hospitalo (Lessines).

Landa kongreso de Espéranto-France: ĝi okazos de la 5^a ĝis la 8^a de majo en Marsejlo. Pli da informoj ĉe: www.esperanto-france.org

KOLOFONO

La *Norda Kuriero* estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: kuriero@esperanto-nord.org

INFORMOJ PRI ESPERANTO

BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)

Prezidantino : S-ino Flory WITDOECKT (Oostende) 059 702 914 flory2@witdoeckt.be
Sekretario : S-ro Claude GLADY (Cerfontaine) 071 644 916 cglady@arcadis.be
Kasisto : S-ro Eric BAERT (Braine L'Alleud) 02 384 82 23 baert.eric@skynet.be

BEF (Defakta Asocio) estas kupola federacio, agnoskita far UEA, por la tri belgiaj regionaj grupoj : APE, FEL, EBG.

ASOCIO POR ESPERANTO (APE)

Honora Prezidanto : Marcelle DELFORGE 071 431 413 mardelforge@brutele.be
Prezidanto : Georges SOSOIS 071 436 205 georges.sossois@gmail.com
Sekretariino : Bernadette PONCELET 087 398 570 bernadetteponcelet@skynet.be
Kasisto : Claude GLADY 071 644 913 cglady@arcadis.be
Eventoj : Valère DOUMONT 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
Promocio Eo : Hubert DEMEYERE 071 502 691 hubert.demeyere@gmail.com
Interreto : Patrice VAN DE VELDE 0478 251 419 patrice.vdvelde@gmx.com
Disvastigado : Guy BASYN 010 688 282 guy.basyn@skynet.be

FLANDRIO : FLANDRA ESPERANTO LIGO (FEL) vzw

Frankrijklei 140 (2000 Antwerpen) 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be www.esperanto.be

FEL eldonas la paperan revuon « HORIZONTALAAL » kaj la retan « VERTIKALE ».

Vi povas mendi librojn en la RETBUTIKO DE FEL : http://www.esperanto.be/fel/but/lis_serchu.php

BRUSELO : ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO (EBG) asbl/vzw

Françoise PELLEGRIN (Rhode-St-Gebèse) 02 358 27 28 franaz@esperantobruselo.org
Nikolao de BUYL (Koekelbergh) 0478 382 981 nikolao@esperantobruselo.org
Laurent LOISSE sekretario@esperantobruselo.org www.esperantobruselo.org
La Grupo eldonas la revuon « AKTUALA » : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>

VERDAJ SKOLTOJ asbl.

[www.verdajskoltoj.net]

info@verdajskoltoj.net

Jean-Pol SPARENBERG Prezidanto 0475/27 23 19 jpsparenberg@gmail.com
Valère DOUMONT Sekretario 0485/51 75 52 doumontvalere@yahoo.fr

GROUPE DES CHEMINOTS : FERVOJISTOJ (BEFA)

Lucien DE SUTTER (BXL-Central) 058 501 825
Cours : 1er et 3ème mercredi, chaque mois de 13h30 à 16h

INTERNACIAJ ORGANIZAJĜOJ - ORGANISATIONS INTERNATIONALES

UEA : Nieuwe Binnenweg 176 NL-ROTTERDAM +31 10 436 1044 www.uea.org
SAT : Av. Gambetta, 67 FR-75020 PARIS +33 9 50 71 01 97 www.satesperanto.org
SAT-AMIKARO : Bd Vincent Auriol, 132 FR-75013 PARIS +33 9 53 50 99 58 www.esperanto-sat.info/

Ĉiuj informoj en franclingva Belgio ĉe Claude GLADY :
rue du CULOT, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916 cglady@arcadis.be

INFORMOJ PRI ESPERANTO EN VALONIO

CHARLEROI : KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA (K.G.E)

Rudy COGNIAŬ (Châtelet) 0492 710 974 rudycogniaŭ@swing.be
Mireille MARNETTE (Marcinelle) 071 324 733 marnette.mireille@skynet.be

LIEGE-ESPERANTO asbl

Denise MAILLET (Embourg) 04 365 15 23 denise.dupont@skynet.be

LOUVAIN-LA-NEUVE : « KVINFOLIO » asbl

André DEMARQUE (Wavre) 0486 516 085 ademarque@skynet.be

VIRTON : GAUME ESPERANTO

Gaby SIMEON (Saint-Mard) 063 571 204

SENLIME + VERVIERS (V.E.G)

Jean-Marie JACQUES (Verviers) 087 330 292 jacques@senlime.org
Jose JACOB (Polleur) 087 221 079

KELMIS (LA CALAMINE) : « AMIKEJO »

Mathieu SCHRYMECKER (La Calamine) 087 853 389

AUTRES VILLES WALLONNES

ATH	Monique VAN ROY	(Ellezelles)	068 542728	
BINCHE	Maxime LECHIEN	(Vellereille)	064 337 826	
CERFONTAINE	Claude GLADY	(Cerfontaine)	071/644 916	cglady@arcadis.be
COMINES	J-C THUMERELLE	(Warneton)	056 557 606	jcthum@gmail.com
DINANT	Maurice WOUTERS	(Onhaye)	082 644 635	eo.wm.5520@skynet.be
GEMBLOÛ	José VINCK	(GembloÛ)	081 613 016	
MONS	Edith COLAS	(Saint-Symphorien)	065 313263	
NAMUR	René PAIROÛ	(Malonne)	081 460 594	rene.pairoŭ@scarlet.be

KOMUNIKADO asbl

Denis FLOCHON (Namur) 081 743 853 info@komunikado.be

SITE INTERNET D'APE

Respondeculoj : <patrice.vdvelde@gmx.com> kaj <hubert.demeyere@gmail.com>
<http://esperanto-wallonie.be/>

BIBLIOTHEQUE D'APE - BIBLIOTEKO

Respondeculo : Claude GLADY [Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916]

ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.)

COTISATIONS POUR APE EN 2016

- **MEM** : Pour être membre de APE : 10 €
- **BUL** : Pour recevoir les bulletins d'informations : 7 €
- **FAM** : Membre supplémentaire de la famille : 3 €

VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE72 000 3258537 16 BIC: BPOTBEB1
de l'Association pour l'Espéranto (APE).

NB: Indiquer les raisons du versement. Exemple : MEM+BUL+2xFAM : 23 €

ABONNEMENT A LA REVUE « ESPERANTO-INFO » : 20 €

Vous pouvez payer directement au compte d'« ESPERANTO-INFO » (conseillé !)

Virement européen au compte IBAN: FR91 2004 1010 0811 9014 6B02 947

Indiquer : « NOM PRENOM pour Esperanto-Info adresse »

Vous pouvez aussi passer par le compte d'APE avec la mention « EoInfo »

Kodo	Universala Esperanto Asocio: UEA 2016		Ricevas
SA	Abono al la revuo "ESPERANTO" de UEA.	41 €	Revuon "ESPERANTO" sen membreco !
Kto	Abono al "KONTAKTO".	25 €	Revuon "KONTAKTO"
MJ	Membro UEA + "Jarlibro"	26 €	"JARLIBRON"
MJ-T	Membro kun Jarlibro ĝis 29 jaro inkl.	26 €	Revuon "KONTAKTO" kaj "JARLIBRO"
MA	Membro Abonanto (MJ + SA)	64 €	Revuon "ESPERANTO" kaj "JARLIBRO"
MA-T	Membro Abonanto ĝis 29 jaro inkl.	64 €	Kiel MA plus "KONTAKTO"
MG	Membro UEA+"Gvidlibro"	11 €	"GVIDLIBRO"
PT	Patrono de TEJO	78 €	la revuon "KONTAKTO" subteno al TEJO sen membreco
SZ	Societo Zamenhof	128 €	Mecenata subteno sen membreco. 12
DM	Dumviva membro de UEA (25xMA)	1.600 €	Dumviva MA

Bonvolu pagi al la konto de la peranto
por UEA-kotizoj en franclingva Belgio :

BE50 750-6373051-18

je la nomo de :

GLADY Claude Rue du Culot, 1
B-5630 CERFONTAINE

UZU LA KUNMETITAN ĜIRILON

BN: La "JARLIBRO" de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj de UEA...

La "GVIDLIBRO" estas la "Jarlibro" sed sen la adresoj !

"KONTAKTO" estas la revuo de la junulara sekcio de UEA : TEJO

BN : Bonvolu nepre motivi vian ĝirilon per kodoj :

Ekzemple : MJ aŭ MA+Kto